Sennaciulo


Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Oktobro 2002 73-a jaro, n-ro 10 (1168)

ISSN 1163.0442 MENSUEL/MONATA

Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

http://www.sat-esperanto.org/ * retadreso: satesper@noos.fr**




76-a KONGRESO DE S.A.T. ĈAŬDEFONO

(La Chaux-de-Fonds)


12-19.07.2003

Pli da informoj aperos en novembra Sennaciulo



SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

El la redaktejo...



Karaj gekamaradoj, kiel vi povos konstati, en tiu ĉi numero la ĉefa kaj plej ampleksa teksto estas la detala Raporto pri la laborkunsidoj en Alikanto. Bedaŭrinde, la eĥo en la salono estis tre forta kaj la magnetofona registraĵo estas malbona. Via redaktoro kaj lia helpantino, nia k-dino Graĵina, kiuj kompilis la tekston, havis tre gravajn problemojn por bone kompreni la intervenojn de kongresanoj en la salono. Povas esti ke io ne estis bone komprenita aŭ mankas en la teksto. Ni petas pardonon. Ja ni ambaŭ faris tiun ĉi laboron plej bone eble. Tamen ni esperas ke ne estos multe da mankoj kaj ke vi estos korekte informitaj pri ĉiuj temoj kiuj estis traktitaj. Dankante pro via komprenemo, plej kamaradece salutas vin, viaj

Graĵina kaj Kreŝo

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@noos.fr.
TTT-paĝoj:
http://www.sat-esperanto.org
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Kreŝimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Jacques BANNIER
Abonnement annuel/jara abono France 52€
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.
Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

Korekto

En la adreso de nia nova hispana peranto okazis eraro. Jen la bona adreso :

Pedro A. Hernandez Ubeda
c/Sainz de Baranda, 44 - 3° D
ES-28009 Madrid

Viaj reagoj...

IEK 2002 en Loveno

Dankon al René Bouchet pro la ĉarma kaj trafa raporto kaj la belaj fotoj! Ankaŭ mi ĉeestis tiun aranĝon unuan fojon. Tamen pri unu punkto de lia raporto mi ne konsentas, nome la mencio de la OSIEK-premio, kiun li komentis jene : *«Post* ***pluraj*** *voĉdonadoj, ĝin* ***finfine*** *ricevis k-do Barkoviĉ.»* (Du vortojn mi grasigis.) Fakte okazis nur **du** voĉdonadoj. Por la kvin kandidatoj pri la premio la rezulto de la voĉdono estis jena :

Auld	14
Barkoviĉ	22
Berveling	8
Cherpillod	7
Mistretta	5

Entute	56

Do, jam la unuan fojon Barkoviĉ ricevis la plej multajn voĉojn. Nur la fakto, ke li ne ricevis la absolutan plimulton, necesigis duan voĉdonadon. Ĝi havis jenan rezulton:

Auld : 22   Barkoviĉ: 34   (entute: 56)

Mi sentis la bezonon mencii tiujn detalojn por tiuj homoj, kiuj ne ĉeestis la aranĝon.

Nora Caragea

Jam estas oktobro kaj pluraj el vi ne pagis ankoraŭ kotizon 2002!
Ĉu forgeso?

ATENTIGO AL NIAJ KUNLABORANTOJ
Ni petas ĉiujn niajn kunlaborantojn sendi al ni siajn tekstojn ĉu per la reto en la formato de teksto aŭ sur la disketoj en la formatoj de Word, Apple (Claris)Works, aŭ prefere en la formato RTF. Bonvolu nepre tajpi viajn tekstojn per la sistemo x (cx = ĉ, sx=ŝ ktp) ĉar tio ebligas al ni facile transformi la tekston en normalan Esperanton. Se vi sendas tekstojn surpapere, vi tajpu ilin normale. Dankon.

La Redakcio

Protokolo de Laborkunsidoj en Alikanto

SOLENA MALFERMO

Marde, la 2-an de julio okazis solena malfermo de la 75-a kongreso de SAT en belega malnova kastelo. Prezidanto de la OKK, k-do **Marteno Bustin** salutis la kongresanojn, bonvenigante ilin al Alikanto kaj al nia 75-a kongreso. Samtempe li pardonpetis pro kelkaj mankoj kiujn la OKK pro manko de tempo kaj kelkaj aliaj problemoj ne sukcesis plenumi. Ĝenerala sekretario de SAT-PK, k-do **Barkoviĉ** invitas unue la preprezentantojn de LEA-oj saluti la kongreson. Nome de SATEB (la Brita LEA) salutis la kongreson k-do **Arturo Prent**. Nome de SAT-Amikaro (franclingvia LEA), salutis k-dino **Juliette Ternant**. Ŝi informas la kongreson pri la tre proksima kunlaboro inter SAT kaj SAT-Amikaro, kiuj dum pluraj jardekoj havis siajn respektivajn sidejojn en la sama lokalo en Parizo. Pro manko de spaco finfine SAT-Amikaro akiris novan belegan lokalon en la 13-a pariza distrikto. Ŝi invitas ĉiujn kiuj vizitos Parizon, viziti ankaŭ tiun novan lokalon kun granda montrofenestro kaj bone lokita ĉe la granda bulvardo. Same ŝi aludis pri la ekspozicio pri Historio de Laborista E-Movado, venigita el Franz-Hüser Instituto (Dortmund - DE), kiun prizorgis, kun gekamaradoj el la pariza SAT-rondo, nia karmemora k-do Ivo Peyraut. Fine ŝi salutas la kongreson nome de SAT-Amikaro. Propranome ŝi salutas la OKK-on pro la farita, farata kaj farota laboro. **K-do Bernabeu** klarigas, ke post la lasta kongreso de HALE li decidis eksiĝi el HALE. K-do Barkoviĉ esprimas deziron ke tiu problemo de HALE estu traktata dum la kunveno de LEA-Komitato. Nome de SLEA salutas la kongreson k-do **Pelle Persson**. Li konstatas kun bedaŭro ke la membroj de SAT estas pli kaj pli maljunaj kaj esperas ke tamen alvenos la junuloj kiuj povos daŭrigi la vivon de SAT.

Sekvas la salutoj de reprezentantoj de diversaj landoj. Nome de aŭstraliaj SAT-anoj kaj de Aŭstralia E-Asocio salutas la kongreson k-do **Bernie Heinze**. Aktuale la aŭstralia registaro estas tre tre dekstra tiagrade ke li mem nuntempe hontas pri sia lando pro agado de tiu preskaŭ faŝista registaro. K-do **Max Hollinger** salutas nome de aŭstriaj esperantistoj dezirante sukceson al la kongreso. Nome de britaj esperantistoj kaj SAT-anoj salutas k-do **A. Prent**. K-do **Jakvo Schram**, kiu "ne kulpas esti belgo", tamen salutas la kongreson nome de belgaj federacioj. Li esprimas la esperon kaj konvinkon ke la novaj membroj alvenas kaj ke la estonto de SAT estas certa. K-dino **Liba Gabalda**, kiel origine Ĉeĥino, salutas la kongreson kaj deziras sukceson. S-ro **Jacques Morin** salutas persone kaj prezentas siajn aktivecojn por enkonduki Esperanton en ekologiajn mediojn. Li informas ke en la reto la Sendependa ekologia partio uzas ankaŭ Esperanton. El Italio salutas nia landa peranto, **Carlo Bourlot** kaj deziras sukceson al la kongreso. Ankaŭ li dankas al la OKK pro la farita laboro. Juna **Irananino** salutis la kongreson nome de iranaj esperantistoj, lando en kiu bedaŭrinde SAT ne havas membrojn. Nome de japanaj SAT-anoj kaj esperantistoj salutis k-do **Yamasaki Seikô.** Li informis la kongreson ke en aŭgusto okazos organiza kunsido en Japanio por fondi la japanan LEA-on. El Litovio salutis la kongreson nia landa perantino, k-dino **Graĵina Opulskiene**, kiu deziras nome de litoviaj SAT-anoj kaj ĝenerale esperantistoj sukceson en laboro kaj agrablajn kongresajn tagojn. K-dino **Corrie Kwantes**, nederlanda perantino salutis nome de nederlandaj SAT-anoj kaj esperantistoj. El Malgaŝio salutis k-dino **Lala** kiu ĝojas povi veni malgraŭ multaj malfacilaĵoj kaj deziras sukceson al la kongreso. K-dino **Zofia Banet Fornalowa**, esprimas la konvinkon pri la estonteco de SAT. La mondo estas en tia situacio ke la asocio kiel SAT estas




Atendante la inaŭguron de la kongreso

Fotis : Gabalda

nepre necesa kaj utila. Jam Zamenhof diris ke por neniu Esperanto estas tiel bezonata kiel por laboristaro. Daŭras la batalo por homa digno, por socia justo kaj ĉiutaga pano. SAT-anoj devas labori en tiu senco. Ŝi salutas la kongreson nome de malmultaj polaj SAT-anoj kaj esperas ke la kongresaj laboroj estos fruktodonaj kaj utilaj por la estonto. K-dino **Aroloviĉ** el Rusio salutas nome de rusoj kaj esperas ke la kongreso montros novan vojon al la SAT-movado. El Ukrainio salutis k-dino **Auderskaja**.

Sekvis la salutoj de diversaj asocioj kaj grupoj. K-do **Manau Torres** salutas nome de KAE en kiu estas pluraj SAT-anoj sed ankaŭ neŭtralaj esperantistoj. Nome de Pariza SAT-rondo salutas k-do **Vincent Charlot**. Li memorigas pri la historia rolo de la Pariza SAT-rondo el kiu venis pluraj konataj SAT-anoj kiel k-doj Lanti, Barthelmess, Bannier, ge-kdoj Glodeau kaj poste k-do Peyraut. Kiel estonta ĝenerala konsilanto por la sideja SAT-rondo li promesas daŭrigi la tradicion kaj kontribui al la komuna laboro en SAT. Nome de la franca E-Centro "Kvinpetalo" salutas k-dino **Thérèse Pinet**, kies fondintoj kaj pluraj membroj de la komitato estas SAT-anoj. K-dino **Stella de Weerd** salutas nome de turista asocio La Naturamikoj kaj speciale de ĝia E-fako TANEF. Ankaŭ ŝi salutas nome de k-dino **Clémentine Staquet**. K-do **René Ballaguy** salutas nome de iu frakcio kiu tamen pli-malpli daŭras. Li plendas pri la fakto ke SAT-anoj ne sufiĉe interesiĝas pri Distribua ekonomio kaj ne aktivas malgraŭ la putra ekonomio de la aktuala socio. Nome de la skipo de pariza Radio Esperanto, kiu nun festis sian dudekjariĝon, salutas la kongreson k-do **Hubert Peyrouty**. K-do **Djemil Kessous** salutas nome de Sennaciista frakcio de SAT kaj deziras fruktedonan laboron. K-dino **Franciska Toubale** salutas nome de "3ZZZ"- Esperanto-radio el Melburno. K-do **Robert Prevost** salutas je la nomo de Liberecana frakcio de SAT. K-do **Stan Keable** el Londono salutas la kongreson je la nomo de Komunista frakcio kaj nome de IKEK (Internacia Kolektivo de Esperantistoj Komunistoj). Estas multe da laboro por SAT en tiu periodo de malvenko de laborista movado. Oni devas ĉion repripensi kaj fari programon por venki la kapitalismon.



Salutas kamarado S. Keable

Fotis: L. Gabalda

Christian Garineau el Chambery salutas nome de pluraj asocioj en kiuj li aktivas. Li proponas ke esperantistoj kandidatu por la Eŭropa Parlamento, eĉ se oni ne estos elektitaj.Tio servus almenaŭ por diskonigi Esperanton al la Eŭropaj parlamentanoj. Krome tiu agado donus eĥon en la amasmedioj. Tion povus fari ne nur SAT sed ankaŭ aliaj asocioj. K-do **Yamasaki**, instige de k-do Charlot salutas senmandate je la nomo de UEA. Universala Kongreso de Esperanto okazos ĉi-jare en Fortalezo (BR) dum kiu la ĉeestantaj SAT-anoj organizos, kiel jam tradicie, la SAT-kunvenon, kiu havas nenian statutan povon. La celo estas propagandi pri SAT kaj neceso de neneŭtrala E-Asocio. Sino **Marie France Conde-Rey** portas la vortojn de k-dino **Perla Martinelli** kiu mem ne povis veni. Ŝi salutas nome de Kooperativo de Literatura Foiro, de KCE kaj de Esperanta Civito, kiuj kune organizos la venontjaran SAT-kongreson en La Chaux-de-Fonds (CH). K-do **Jakvo Schram** salutas nome de Ĝeneralaj Konsilantoj de SAT. **J.M. Salguéro** kiel respondeculo pri la eksteraj kontaktoj de la esperantista parto de anarkiista sindikato Hispana CNT kiu fondiĝis pasintjare, salutas la kongreson. K-do **Vincento Charlot** salutas nome de la pariza teamo de UEA ĉe UNESKO.

Fine parolas Ĝenerala sekretario, k-do **Barkoviĉ**. Li diris : "La pasinta jaro estis por SAT tre malfacila, ĉefe kiam en januaro ni perdis nian prezidanton, kdon **Yves Peyraut**, kiu estis tre, tre valora membro de nia movado. Li estis la ĉefa motoro inter ni PK-anoj kaj li intencis partopreni al tiu ĉi kongreso. Do, hodiaŭ li devus esti ĉi tie. Bedaŭrinde li ne plu estas. Ni troviĝis subite en tre malfacila situacio, ĉefe mi, kiu estas via laboristo, kiun vi pagas. Mi havas multe da laboro kaj nun ankoraŭ pli, kiam Ivo ne plu estas ĉi tie. Li ja venis regule, ĉiumerkrede al la SAT-ejo kaj dediĉis kompletan posttagmezon al SAT. Li preparis multajn dosierojn, zorgis pri ĉio, kaj estis informita pri ĉio. Multe li helpis al mi. Li estis ne nur mia kamarado sed mia amiko. Mi do perdis grandan amikon. Sed, tio estas la vivo kaj ni devas daŭrigi nian asocion kaj nian movadon, tiel kiel Ivo deziris.


Mi volas ripeti al vi ĉiuj kaj informi la novulojn, ke dum niaj SAT-kongresoj la laborkunsidoj estas publikaj, ke ĉiuj estas invititaj kaj rajtas partopreni en la debatoj kaj libere esprimiĝi. Nur la SAT-membroj rajtas

voĉdoni. Mi vidas en la salono sufiĉe multe da novaj vizaĝoj, de esperantistoj kiuj venis la unuan fojon kaj konas neniun kaj nenion pri ni. Do, mi invitas ĉiujn malnovajn SAT-anojn iri al ili, konatiĝi, helpi al ili senti sin hejme en nia medio. Ni faru ĉion por ke ili ne nur deziru reveni sed ankaŭ decidu aliĝi al SAT. Tio nur eblos se vi montros al ili ke ili estas bonvenaj kaj dezirataj inter la SAT-anoj.

Fine, mi deziras al ĉiuj el vi agrablan restadon en Alikanto, kaj sukcesan, fruktodonan kongreson".

Per tio finiĝis la solena inaŭguro. Sekvis honorvino kun agrabla babilado kaj komuna fotado.

***



La ĉefredaktoro de la Nova P.I.V. k-do Michel Duc Goninaz (dekstre) inaŭguras ĝin. Maldekstre, k-do Barkoviĉ.

Fotis: L. Gabalda

UNUA LABORKUNSIDO

Tute en la komenco oni elektas la prezidontojn de la kongresaj laborkunsidoj, la membrojn de la proponkomisiono kaj la voĉdonkomisiono. La kongreson ne gvidas la Plenum-Komitato sed la kongresanoj. Kiel prezidantoj estas elektitaj gek-doj **Arturo Prent, Jakvo Schram**, **Graĵina Opulskiene** kaj **Franciska Toubale**. Kiel membroj de la proponkomisiono estas elektitaj k-doj **Michel Duc Goninaz**, **Hubert Peyrouty**, **Vincent Charlot**. Kdo **Schram** estas preta transdoni siajn ideojn al la komisiono. Kalkulkomisiono konsistas el gekdoj **Arlette Duc Goninaz** kaj **Max Hollinger**.

Antaŭ la komenciĝo oni memoras pri la forpasintaj gekamaradoj el la lasta jaro per unuminuta silento.

La unuan laborkunsidon prezidas kamaradino **Graĵina Opulskiene**.

Plenumkomitato :

Intervenas k-do **V. Charlot** kaj proponas amendon al la lasta frazo el la raporto, kiu diras ke la P.K. plenumis ĉiujn siajn taskojn el la lasta gvidrezolucio. La amendo tekstus : « La P.K. provis plenumi ĉiujn siajn taskojn el la lasta gvidrezolucio «. La lasta gvirezolucio estis tre kompleksa kaj ekstreme grava, pro kio la P.K. ne povis plenumi ĉion el ĝi.

K-do **Barkoviĉ** petas pli da klarigoj pri la celo de tiu amendo kaj ankaŭ kion fakte la P.K. ne plenumis. K-do **Charlot** citas la paragrafojn el gvidrezolucio kiuj komenciĝas per : « la kongreso subtenas… «. K-do **Duc Goninaz** opinias ke la interveno de k-do Charlot ne estas prava ĉar tiuj paragrafoj ne rekte koncernas Plenum-Komitaton. K-do **Ballaguy** kiel PK-ano klarigas ke la PK faris kion ĝi povis, sed ke kiam oni petis helpon kaj kunlaboron, neniu anoncis sin. K-do **Charlot** klarigas ke ne temas pri kritiko de la P.K. sed simpla konstato ke ĝi provis plenumi ĉiujn siaj taskojn. K-do **Rollin** demandas pri la estonta P.K. ĉar pluraj nunaj P.K.-anoj ne plu kandidatas. K-do **Barkoviĉ** prezentas la aktualan situacion rilate al la estonta P.K., sekve al la lasta ŝanĝo en la Statuto. Li klarigas kiajn malfacilaĵojn oni havis por trovi ses kandidatojn por la nova P.K. kiuj estis prezentitaj en Sennaciulo. Fakte li riproĉas al la SAT-anaro facile fari ŝanĝojn kaj kiam oni devas agi aplikante la ŝanĝon, neniu anoncas sin. Estus bone ke tiuj, kiuj voĉdonis por la ŝanĝo nun anoncu sin kiel kandidatoj. La kongreso havas rajton akcepti novajn kandidatojn, kvankam la periodo por kandidatiĝoj jam finiĝis. Ni bezonas homojn. Do, levu la manojn kiuj akceptas kandidatiĝi.K-do **Charlot** voĉdonis por la ŝanĝo kaj ĝi estis necesa ĉar la Pariza SAT-rondo ne plu havas fortojn por doni novajn kandidatojn. K-do **Bustin** klarigas ke li faris tiun proponon por ebligi al pli da SAT-anoj en la tuta mondo kandidatiĝi ĉar tio estas pli justa. La prezidantino de la kunveno, k-dino **Graĵina Opulskiene**, konstatas ke oni revenas al tiuj klarigoj, kiujn jam oni faris en la lasta kongreso kaj proponas transiri al alia punkto. K-do **Barkoviĉ** rifuzas tion kaj opinias ke oni devas fini tiun punkton per iu decido antaŭ ol transiri al la nova punkto, ĉar tiu ĉi estas tre grava. Temas pri la estonto de SAT. Li diras ke efektive en Parizo nun mankas kandidatoj, sed laŭ la antaŭa sistemo krom Parizo multaj aliaj urboj kaj rondoj rajtis kandidati kaj neniam tio okazis. Nun ĉiu individuo en la mondo rajtas kandidati kaj denove neniu anoncas sin. Tio ne estas normala. Oni volas ŝanĝi ion kaj poste neniu akceptas aktivi. Al kio do servas la ŝanĝoj en tiu kazo ? Nun devus veni el la tuta mondo dek, dudek kandidatoj, ĉar tio nun eblas. Fine, venis nur unu. K-do **Schram** diras ke li kandidatiĝis, kvankam li voĉdonis kontraŭ la ŝanĝo. Nun ĉiuj respondas ke ili ne havas tempon. Sed ne ekzistas homoj kiuj havas tempon. SAT-bezonas homojn kiuj pretas ion fari kaj agadi. K-do **Cavalier** opinias ke la estonto montros al ni la eblecon agadi laŭ la nova sistemo, ĉar necesas posedi retaliron kaj multaj ankoraŭ ne posedas ĝin.

K-do **Bustin** opinias ke la nova sistemo donas al ĉiuj SAT-anoj rajton agadi en la P.K. sed nun oni devas fari laŭ la eblecoj. K-do **Rollin** opinias ke oni devus klarigi la taskojn de la P.K. antaŭ ol oni decidiĝu kandidati. K-do **Barkoviĉ** klarigas ke la tasko de la P.K. estas : a) plenumi la taskojn kiujn donas al ĝi ĉiujara kongreso, b) plenumi kaj trakti ĉiujn taskojn kiuj venas dum la jaro al la SAT-

sidejo. Ĝi devas zorgi pri la politiko de SAT, kaj pri administraj aferoj, kiuj estas ofte lokaj, eĉ tre lokaj. Ĉar la sidejo estas en Parizo, estas multaj aferoj pritraktendaj kaj



Jam konata klaŭno. Nia k-do Jerzy Fornal dum sia teatra prezentado.
Fotis: L. Gabalda

plenumendaj, kiuj rilatas al francaj leĝoj aŭ urbaj instancoj. UEA havas internacian Komitaton kaj administran grupon en Roterdamo. Bone, sed ĉe SAT se la pariza skipo estus administra, kie estas tiu internacia Plenum-Komitato ? Kiu zorgos pri la politiko de SAT ? Taskoj estas multaj kaj ĝis nun la P.K. kunvenis dufoje monate. Ĉiam estis io por trakti kaj solvi. K-dino **Sabatier** klarigas ke oni devos rete kontakti la alilandajn P.K.-anojn dufoje semajne, kiam ili devos esti ĉe siaj aparatoj, por akcepti mesaĝojn kaj respondi laŭbezone. K-do **Jakvo Schram** esperas ke la P.K. distribuos inter si la taskojn kaj ĉiu ano respondecos pri sia tasko. Do parizaj k-doj ne bezonos zorgi pri tio. Dum la kunveno estos facile havi rektan kontakton per la nunaj modernaj eblecoj. K-dino **Zofia Banet-Fornalowa** opinias ke oni ne devas fari abruptajn ŝanĝojn kiam la asocio ne estas sufiĉe bonfarta. Ne estas nur la P.K. kiu respondecas pri SAT sed ĉiuj ĝiaj membroj. K-dino **Franciska Toubale** respondas al Zofia ke ne temas pri ŝanĝoj, ĉar la ŝanĝo jam estas farita, sed oni serĉas kandidatojn, kaj ĉar Zofia pretas agadi, ŝi povus kandidati. K-do **Barkoviĉ** konstatas ke ĝis nun oni multe parolis sed kia estas la rezulto, la konkludo de tiu babilado. Li invitas iun el la kongresanoj fari konkludon post ĉiuj tiuj intervenoj. Kion do oni decidas ? K-do **Peyrouty** opinias ke oni devas akcepti la staton de kandidatoj tian kia ĝi nun estas, do ses jam anoncitaj plus du novaj dum la kongreso. Fine akceptas kandidatiĝi k-doj **Marteno Bustin** kaj **Arturo Prent** post longa persvado.

Billy Waldon

K-do **Barkoviĉ** klarigas ke la PK provas fari ion por liberigi lin. Bedaŭrinde la kontaktoj kun s-ano **Harmon** en Usono ne plu funkcias, kaj estis li kiu donis al ni informojn. Estus bone ke iu membro de la P.K. zorgu pri tiu dosiero. Pri la situacio en la P.K. post la morto de **Yves Peyraut**, li klarigas, ke estas laŭleĝa vicprezidanto kiu aŭtomate anstatauigas lin ĝis la venontaj balotoj. Tiun rolon nun ludas k-do **Jacques Bannier** kiu estis leĝa vicprezidanto por la franca administracio. La nova P.K. devos elekti inter si la novan prezidanton de la P.K. K-dino **Franciska Toubale** informas pri la letero de Billy Waldon kiun ŝi ricevis kaj en kiu li informas pri la morto de lia amikino kiu zorgis pri li kaj la financoj. Nun li bezonas monon por sia defendo.K-do **Barkoviĉ** klarigas ke tiu letero aperis en Sennaciulo. K-do **Charlot** informas ke laŭ s-ro **Harmon**, oni timis ke post la atenco de la 11-a de septembro oni plirapidigos la ekzekutojn. Do Billy Waldon preferis ke oni ne plu parolu pri li por provi iamaniere iom forgesi lin kaj lian kazon. K-do **Tereza Sabatier** informas ke SAT malfermis la fonduson Billy Waldon en kiu estas malmulte da mono. Ŝi proponas kolekti monon dum la kongreso por tiu fonduso.

Grupo Portos

K-do **Prent** informas ke nun oni povos aktivigi Amnestion Internacian en tiu kazo.

Oni transiras al la punkto, seminario pri la rolo de maldekstro en la E-movado kiu okazis en La Chaux-de-Fonds. K-do **Prent** demandas ĉu oni povos legi la prelegon kiun faris k-do Barkoviĉ en tiu okazo. K-do **Barkoviĉ** klarigas ke ne estis prelego sed prezento de SAT laŭ ĝia historio kaj ĝia rolo en la E-movado. K-do **Charlot** demandas kia estos la sekvo de tiu seminario en la Chaux-de-Fonds. K-do **Barkoviĉ** respondas ke li ne scias, ĉar li ne organizis ĝin. Bedaŭrinde ĝin partoprenis tre malmultaj personoj pro diversaj personaj konfliktoj inter esperantistoj kaj oni povas bedaŭri ke SAT-anoj ne ĉeestis, ĉar la temo estis tute SAT-eca. Pro diversaj konfliktoj aŭ malsimpatioj, tiaj konferencoj ne havas sukceson. Fakte ĝin devis partopreni ankaŭ nia k-do **Peyraut**, kaj pro lia forpaso finfine mi estis sola.

Nun okazis dekminuta paŭzo.

Membraro

K-dino **Toubale** informas ke en Aŭstralio dum ĉiuj renkontiĝoj oni provas paroli pri SAT kaj varbi novajn membrojn. Ĝis nun estis kelkaj sukcesoj. K-do **Charlot** opinias ke la problemo de membraro estas tre grava kaj ke necesus dediĉi alian kunsidon al ĝi, post la fintraktado de la raporto.K-dino **Juliette Ternant** opinias ke la problemo de la membraro estas precipe la problemo de LEA-oj, ĉar unu el iliaj ĉefaj taskoj estas varbado por SAT. Sam-

tempe ŝi invitas ĉiujn vizitantojn de Parizo viziti la novan sidejon de SAT-Amikaro. K-do **Cavalier** opinias ke SAT devus ĉeesti diversajn E-aranĝojn por diskonigi sin kaj varbi membrojn inter jam ekzistantaj esperantistoj. La seminarioj kiel tiu en La Chaux-de-Fonds kaj Gento estas tre gravaj. K-do **Schram** opinias ke oni devas tute klare diri al ĉiuj esperantistoj kio estas SAT, ĉar oni provas meti ĝin en iun direkton (ofte oni diras ke SAT estas komunista, ktp), kaj oni devas bone klarigi ke ĝi estas neneŭtrala, supertendenca, kleriga asocio.

Administrado

Nenia komento.

Rilatoj kun LEA-oj

Nenia komento.

Konflikt-Komisiono

K-do **Charlot** opinias ke la kvereleto inter li kaj k-do **Bannier** ne koncernas konfliktkomisionon. Pri tio oni parolos iomete poste.

Ĝenerala Konsilantaro

Nenia komento.

Landaj perantoj

K-dino **Sabatier** atentigas ke estos plej bone ke ĉiuj kamaradoj el eksterlando pagu siajn fakturojn al la landa peranto, aŭ se ili havas konton ĉe UEA, tra tiu konto. Tiel ni evitas gravajn elspezojn. Do resume, ĉiuj pagu ĉion pagendan al la peranto.

K-do **Prent** petas ke tiujn indikojn oni oficialigu per la aperigo en la kasraporto.

K-do **Hollinger** plendas ke aŭstroj ne povas pagi la kongreskotizon antaŭ la decembro (la plej favoran) ĉar la pagilo sendata de la peranto alvenas tro malfrue (do poste). Estus bone ke li sendu ĝin pli frue.

K-do **Yamasaki** demandas kia estas la sinteno de SAT rilate al pago tra UEA ? K-do **Barkoviĉ** klarigas ke SAT havas konton ĉe UEA (**satx-s**) kaj tiuj kiuj ankaŭ havas konton ĉe UEA povas pagi de sia konto al la nia. Tiel ni ŝparas la bankelspezojn.

Sennaciulo

Nenia komento

Sennacieca Revuo

Nenia komento

Eldonoj kaj librovendado

K-do **Peyrouty** informas ke la libroservo funkcias ekster la laborkunsidaj horoj. K-dino **Sabatier** informas ke ĉe SAT kuŝas pluraj librokvantoj kiuj ne vendiĝas. Eĉ la lastaj eldonoj ne vendiĝas. Kion fari por vendi ilin ? K-do **Barkoviĉ** substrekas ke la lastaj eldonoj, «La Fremdulo» kaj «Vualo de l'silento» estas aĉeteblaj en la libroservo. Tiuj, kiuj ne posedas ilin profitu la okazon ĉar tiel ili ŝparas la afrankon. K-do **Monier** konstatas ke SAT-Amikaro kaj UEA vendas la librojn, do kial SAT ne vendas. La solvo estas kunigi ilin. K-dino **Sabatier** klarigas ke tiuj libroservoj por vendi SAT-librojn, devas aĉeti ilin ĉe SAT. Do, ĉar ili ne aĉetas, tio signifas ke ili ankaŭ ne vendas ilin. La solvo estas ke esperantistoj aĉetu librojn. SAT vendas pli da vortaroj ol da aliaj libroj.

Per tio finiĝis la unua laborkunsido.

***

DUA LABORKUNSIDO

Prezidas k-do **Jakvo Schram.** Daŭrigo de la traktado de Raporto de la P.K.

SAT kaj la reto

K-dino **Sabatier** opinias ke necesus klarigi pli pri la diskutgrupoj en la reto. Estus bone scii kiom da personoj partoprenas en ĝi, ĉar multaj sekvas la debatojn kaj ne mem partoprenas.

K-do **Prent** proponas ke oni prezentu kaj montru al ĉiuj niajn SAT-paĝojn en la reto, ĉar tion ebligas la instalaĵoj en la universitato. Same oni povas montri la aliajn komunikeblecojn de la reto. Decidite tion fari en venonta laborkunsido.

Filatela servo

K-do **Suarez** demandas ĉu SAT ricevis iun informon de k-do Ramelli. K-do **Schram** respondas ke la respondo al tiu demando troviĝas en Sennaciulo.

Amikeca Reto

K-do **Rollin** demandas ĉu eblas diskuti tuj aŭ ne pri Amikeca Reto. La prezidanto respondas ke prefere oni unue aprobu la aperintan tekston en la raporto kaj oni diskutos poste. K-do **Barkoviĉ** proponas ke kiel respondeculo li povas tamen eventuale aldoni ion.

Junulfako

Bedaŭrinde la respondeculoj de la Junulfako ne partoprenas al la kongreso kaj oni povas nur aprobi aŭ malaprobi la raporton. Neniu reago!

Frakcioj

K-do **Hollinger** invitas ĉiujn al la posttagmeza kunveno de la liberpensuloj, por revivigi ĝin. K-do **Ballaguy** parolas pri la frakcio pri Distribua ekonomio. Ĝi ne estas tre vigla. Li invitas la kongresantojn aĉeti libreton "La tria vojo", por konatiĝi kun tiu movado. K-do **Prevost** parolas pri Liberecana frakcio, kiu bone funkcias. K-do **Suarez** ŝatus ke oni parolu pri la Ekologia frakcio, ĉar la manĝaĵoj kiujn ni manĝas estas venenitaj. K-do **Charlot** volas atentigi ke la rolo de frakcioj estas labori en propraj medioj, esperantigi ilin kaj venigi al SAT. Ekz. Komunista frakcio ne volas komunistigi SAT-anojn sed esperantigi komunistojn kaj venigi ilin al SAT. K-do **Suarez** opinias ke tio estas rolo de LEA-oj kaj ne de frakcioj. K-dino **Ternant** opinias ke la rolo de frakcioj estas kunigi SAT-anojn kun samaj ideoj kaj ne venigi novajn al SAT. Tiu rolo estas la rolo de LEA-oj. La frakcioj rajtas uzi kolumnon en Sennaciulo por siaj komunikoj kaj tion ili uzu. K-do **Duc-Goninaz** informas ĉiujn ke ili legu la Statuton pri la rolo de frakcioj kiu diras klare la samon, kion diris k-do Charlot. K-do **Keable** proponas ke oni akceptu la tekston kaj poste diskutu pri frakcioj.

Kongresoj

K-do **Charlot** volas fundamente kritiki la decidon de la P.K. kongresi en La Chaux-de-Fonds, en KCE. Pasintjare la kongreso rifuzis havi iun ajn ligon kun Esperanto-Civito. Prifajfante tiun kongresan decidon, la PK decidis tamen kongresi ĉe tiu "sekto", sen serĉi alian grupon kiu povus organizi la kongreson. Tio estas la kulpo de la P.K. Fundamenta trajto de Esperanto Civito estas ke ĝi estas ŝtatisma. Ĝi konceptis sistemon ŝtatan sen teri-

torio. Ĝi havas senaton, ne proporcie elektitan, standardon, emblemon, blazonon, himnon, kortumon, ktp. Se vi subskribus pakton, vi ne rajtus libere foriri. Tio estas en ilia Ĉarto. K-do **Barkoviĉ** interrompas lin atentigante ke nun oni parolas pri la teksto "Kongresoj" kaj ke tio ne estas en ĝi. Do, li povos paroli pri tio poste sed ne nun kiam pri tio ne temas. Okazas vera skandalo kun krioj kaj preskaŭ fizika batalo kiun finfine oni sukcesis eviti. K-do **Charlot** krias ke temas pri stalinisma sinteno, faŝismo, ktp. La prezidanto, k-do **Schram** provas trankviligi lin. Li permesas al k-do **Charlot** fini sian paroladon, kondiĉe ke ĝi estu mallonga, kaj ke li ne kriu. Li parolas pri la ruĝa listo de Esperanto civito, kiu estas laŭ li tro ruĝa, stalinista. Ĉu ni kunvenu en sekto en kiu estas stalinistoj, naciistoj kaj eklezio? Sed tio estas malpli danĝera afero. La pli danĝera estas ke ili ŝtelis "Heroldon de Esperanto", ke ili volis akapari la "Kvinpetaloj" ktp. Mi kredas ke la membroj de Civito estas tute sinceraj homoj, sed ĉiam aliĝantoj de sektoj estas viktimoj. Do, ni devas trovi solvon por ne kongresi en tiu sektejo. La prezidanto de la kunveno, k-do **Schram**, indikas ke tute malplaĉas al li la sinteno kaj maniero de k-do Charlot. Li notas, ke Charlot nomis lin faŝisto. Li invitas k-don **Barkoviĉ** respondi al tiu reago de k-do Charlot. K-do **Barkoviĉ** turnas sin al k-do Charlot kaj diras: "Mi povas kompreni ke vi malŝatas la Civiton kaj tio estas via problemo, sed ĉi tie tio ne estis la temo. Ĉi tie temis pri kongresoj kaj ne pri Civito. La kongreson invitis KCE kaj ne Civito. Se inter la homoj, kiuj organizas la kongreson estas membroj de la Civito, tio estas alia afero. Ja, vi kaj aliaj estas membroj de diversaj partioj, kaj tamen vi povas organizi la kongresojn. Nu, ni ne havas multe da eblecoj por la organizado de kongresoj. Ekz. en 2004 ĝi devis okazi en Germanio kaj antaŭ mia foriro al la kongreso mi eksciis ke ĝi ne okazos, ĉar la organizantoj ne povas tion fari pro diversaj kialoj. Ni ne havas multe da eblecoj, kaj kiam aperas ebleco, ĉu ni rifuzu ĝin ĉar iuj homoj membras en iu alia movado aŭ grupo? Mi parolis kun la organiza komitato kaj vizitis la lokojn. La OKK havas la regularon pri la organizado de SAT-kongresoj kaj ili akceptis organizi ĝin laŭ tiu regularo. La lokoj mem tre taŭgas kaj estas tre belaj. Oni diras al mi ke mi estas naiva. Povas esti, sed mi opinias ke ni SAT-anoj estas plenkreskaj kaj kapablaj protekti nin kaj nian asocion de iu ajn kaj ie ajn. Se tio ne estas vera, tiam mi ne vidas la solvon. Jam estas ses personoj en la OKK kiuj komencis okupiĝi pri diversaj organizaj detaloj kaj mi estas certa ke ĝi estos bone organizita. Jam plurfoje neŭtraluloj organizis niajn kongresojn, kaj ni ne fariĝis pro tio neŭtraluloj. Do, jen la respondo. Ĉiakaze, nun ni devas akcepti aŭ malakcepti la paragrafon pri la kongreso en la raporto. Poste ni parolos pri la kongresoj kaj la reprezentantino de la organiza komitato invitos nin al La Chaux-de-Fonds. K-dino **Banet-Fornalowa** atentigas pri la konduto de intervenantoj kaj la respekto de aliaj. Laŭ ŝi la kongresanoj kiuj estas la unuan fojon en la kongreso povos havi nur malbonan opinion pri SAT-kaj SAT-anoj, vidante kaj aŭdante tiajn intervenojn. Ĉiuj homoj kiuj proponas sin por organizi la kongreson estas idealistoj al kiuj oni devas esti dankemaj. La kongreso povas akcepti aŭ malakcepti la inviton, sed oni ne rajtas insulti kaj ofendi la homojn. K-do **Duc Goninaz** opinias ke oni devas nun diskuti pri la teksto, sed laŭ la teksto estas dirite ke la venonta kongreso okazos en La Chaux-de-Fonds kaj la diskuto pri tio eĉ ne plu havas sencon. K-do **Barkoviĉ** definitive respondas pri tiu paragrafo. Oni povas rifuzi ĝin kaj poste oni povos paroli pri la kongresoj, sed oni devas fini la raporton. Dum la kongreso en Nagykanizsa, post la decido ke SAT ne aliĝos al la Civito, kaj anonco ke KCE invitas al La Chaux-de-Fonds, la kongreso donis la mandaton al la P.K. ke ĝi esploru la eblecojn. La PK esploris la eblecojn. Mi mem vizitis la lokojn kaj laŭ mi instalaĵoj kaj lokoj tute taŭgas. La promesoj de la OKK ke ili respektos la regularon pri la organizado de la SAT-kongresoj. Mi transdonis tiujn informojn al la P.K. kaj ĝi decidis. Laŭ la paragrafo 18, paĝo 7 de la SAT-Statuto estas dirite: "*Ĉiujare okazas Kongreso de SAT, kies lokon, daton kaj kondiĉojn difinas la P.K., laŭeble konforme al deziro de la antaŭlasta Kongreso*". Do, ĉio estas klara. K-do **Rollin** rimarkigas ke mankas paragrafo en la raporto pri la Broŝurservo kaj li demandas ĉu tio estas intenca aŭ hazarda. K-do **Barkoviĉ** respondas ke efektive, iamaniere tio eskapis al li kaj li forgesis verki ion. Sed



Dum la ekskursoj oni ĝuis ne nur belegajn lokojn sed ankaŭ tre bongustajn manĝojn

Fotis: L. Gabalda

li atentigas ĉiujn kiuj respondecas pri io en la SAT-movado, ke ili devus sendi siajn proprajn raportojn por la jara raporto. Ankaŭ k-do **Rollin** ne sendis kaj k-do **Barkoviĉ** ion verkis mem. Same se k-do **Baudé** sendus ion, tio aperus kaj ne okazus forgeso. Oni voĉdonas pri la paragrafo "Kongresoj". Ĝi estas aprobita per 38 por, 4 kontraŭ kaj 11 sindetenoj.

Kasraporto

Ĉiuj partoprenantoj ricevis la financan raporton de SAT. La kasistino de SAT, k-dino **Tereza Sabatier** estis je la dispono de kongresanoj. Ŝi konstatas ke la rezulto de la jaro estas daŭre malprofita. SAT ne havas sufiĉe da membroj por ke ni povu aktivi kun eta profito kiu estus necesa por ke ni senzorge aktivu. Bedaŭrinde, ni havas multe da libroj kiuj ne vendiĝas, inter ili eĉ la plej lastaj eldonaĵoj. K-dino **Sabatier** prezentas kaj klarigas diversajn punktojn de la kasraporto. K-do **Yamasaki** demandas kiel statas la proceso kun la najbaro. K-do **Barkoviĉ** klarigas ke ĝi estas finita kaj ke ni ne plu havas elspezojn rilate al tio. K-do **Duc Goninaz** konstatas ke la deficito kiu estas ĉiujare manĝos la asocian kapitalon post kvar jaroj. K-dino **Sabatier** klarigas la kontadon kaj invitas ĉiujn ekster Francio kiuj pagas al SAT, ne pagi rekte sed ĉu tra la landa peranto, aŭ tra UEA ĉe kiu SAT havas konton. Tiel SAT ne perdas la monon. K-do **Cavalier** dankas al K-dino Sabatier pro ŝia laboro kaj k-dino **Juliette Ternan**t aldonas dankojn al la revizoroj, k-dino **Meurant** kaj k-do **Billard** kiuj (ambaŭ) en tiu ĉi momento estas malsanaj. Oni voĉdonas pri la financa raporto. Por 56, kontraŭ 0, sindetenoj 3.

Fine oni voĉdonas pri la kompleta raporto de la Plenum-Komitato. Por 53, kontraŭ 0, sindeteno 6. Do la raporto estas aprobita.

Paŭzo.

Post la paŭzo oni komencas diskuti pri diversaj problemoj en la asocio, inter kiuj estas la nesufiĉa nombro da membroj. Evidente, la dua tasko de ĉiu LEA-o estas varbi al SAT kaj provizi la asocion per novaj membroj. Oni povas konstati ke sufiĉe multaj membroj de niaj LEA-oj ne estas membroj de SAT. La tasko de LEA-oj estas klare klarigi al siaj membroj kia estas la diferenco inter SAT kaj LEA. Multaj membroj de LEA-oj kredas esti membroj de SAT. La plej forta LEA estas SAT-Amikaro kaj la plej granda SAT-kolektivo estas franclingva. Tamen, eĉ multaj SAT-amikaranoj ne estas SAT-anoj.

Do, LEA-oj havas multon por fari en tiu senco. Gek-doj **Ballaguy** kaj **Sabatier** opinias ke oni devas ankaŭ serĉi membrojn en la movadoj kiel ATTAC kaj simila, kiuj nepre bezonas Esperanton por la internaciaj kontaktoj. K-dino **Ternant** malfacile akceptas la kritikon ke SAT-Amikaro ne sufiĉe varbas por SAT. Ĝi eĉ eldonis faldfolion kun klarigo pri la diferenco inter SAT kaj SAT-Amikaro. Estas vero ke parto de SAT-Amikaranoj ne estas SAT-anoj sed plej ofte la klarigo estas ke ili ne havas sufiĉe da mono por pagi kotizon al du asocioj. La PK kiu ofte kunlaboras kun SAT-Amikaro tion tre bone scias. K-do **Salguero** opinias ke oni ne sufiĉe interesiĝas pri komencantoj kaj neesperantistoj dum la kongreso. Laŭ li necesus organizi kursojn por komencantoj kaj neesperantistoj, kaj prepari specialajn programerojn por ili. Tiel ili enuas kaj sentas sin forlasitaj. Ankaŭ mankas la junuloj, sed estas vero ke ilin tute ne povas altiri la laborkunsidoj de SAT. K-dino **Fornalowa** opinias ke oni devas insisti pri la kultura valoro kaj aktivado de SAT. Kiam oni montras novan PIV kaj diras ke ĝin eldonis SAT, tio certe povas esti efika kaj estas grava por la valorigo de nia asocio. La insultoj kaj kvereloj en niaj revuoj kaj kongresoj nur povas forpuŝi eventualajn novajn membrojn. K-do Charlot konstatas ke la LEA-oj kelkfoje ne bone funkcias. Ankaŭ ni havas frakciojn kies laboro estas en sia propra medio propagandi kaj varbi. Dum la jaro, kiam estas grandegaj manifestacioj, konferencoj, ktp, ke la PK devus sendi sian apogon, eĉ se ne eblas sendi iun personon. Tio estas tre grava kaj povus helpi por la akiro de novaj membroj. K-do **Keable**, kiu la unuan fojon partoprenas SAT-kongreson, kritikas ke ĝi estas sufiĉe kaosa kaj senstruktura. Oni perdis tro da tempo por aprobi la jarraporton kaj nun post la paŭzo oni denove parolas pri la samaj aferoj. Laŭ li la plej grava afero devus esti rezolucio kiun oni faros fine de la kongreso kaj pri ĝi oni devus diskuti. Li mem jam komencis surpaperigi la ideojn. K-dino **Tereza Sabatier** respondas al k-dino Ternant ke efektive lastatempe SAT-Amikaro iom pli propagandas pri SAT kaj ke ŝi donis ĝin kiel ekzemplon. K-do **Rollin** opinias ke nun la homoj bezonas esperon kaj ni ne trovos novajn membrojn se ni proponas nenion krom la jaran kongreson. Ni ne devas nur proponi diskutojn sed ankaŭ aktive partopreni en la laboristaj manifestacioj kaj movadoj kaj kun la montro de esperantlingvaj banderoloj. K-do **Prent** analizas kial la homoj lernas aŭ ne lernas Esperanton. Ili devas havi bezonon pri ĝi - ekzemple komunikado kun eksterlando. Se tiuj homoj aktivas en sindikatoj aŭ laboristaj medioj, ili trovos eventuale la vojon al SAT. K-do **Duc Goninaz** faras kelkajn rimarkojn. Li diras ke ne estas la rolo de la SAT-kongresoj akcepti la neesperantistojn por altiri ilin al Esperanto, ĉar tio estas la rolo de LEA-oj, grupoj ktp. La SAT-kongreson principe partoprenu personoj kiuj kapablas esprimi sin en Esperanto. La dua afero estis la demando, kial junaj homoj, progresemaj, lernus Esperanton? Ja lingva problemo estas socia problemo. Ekzistas lingva imperiismo, ĉar la ŝtatoj trudas la lingvojn kaj Esperanto povas esti solvo.

K-do **Schram**, kiel prezidanto de la laborkunsido, resumas ĉion diritan sed revenas al la demando, kiel plimultigi la membraron, ĉar fakte tio estis la komenca demando de la diskuto.

K-do **Barkoviĉ** reagas, dirante: Dum tiuj diskutoj ni ofte aŭdis la frazon "SAT devus fari tion, SAT devus partopreni en tio... Mi ŝatus ke ili diru: **Ni** devas partopreni en tio, **ni** devas fari tion kaj tion., kaj ke la homoj diru: **mi** volas tion kaj tion fari. Sekvu **min**. Kiam oni diras ke SAT devas fari, tio estas kvazaŭ vi estus ekstere kaj tio ne koncernas vin, sed tio koncernas SAT. Kio estas SAT? SAT estas vi, ni ĉiuj estas SAT. Ja, sen vi ĉi tie la SAT-kongreso ne okazus. Do, mi petas ke vi donu konkretajn proponojn kaj decidu pri ilia realigo. Aliel la kongreso finiĝos kaj restos la decido ke SAT devas fari... K-dino

Ternant respondas al la demando de Jakvo, kiel duobligi la SAT-anaron. Sufiĉas ke ĉiu membro venigu al SAT nur unu novan membron kaj ni duobligos la membraron. Per tio finiĝis la dua laborkunsido.

***

TRIA LABORKUNSIDO

La kunsidon gvidis **k-dino Franciska Toubale**.

Komence de la kunsido, la ĝenerala sekretario de SAT **k-do K.Barkoviĉ** demandis *k-don* **M.Duc Goninaz** ĉu li pripensis la sugeston de nuna PK kandidatiĝi por nova PK. *K-do* **M.Duc Goninaz** diris, ke li decidis ne kandidatiĝi. **K.Barkoviĉ** esprimis la bedaŭron pri tiu decido kaj prezidantino de la kunsido *k-dino* **F.Toubale** komentis, ke en tiu kazo ne estos surprizo post voĉdonado, ĉar PK devas esti el 8 personoj kaj nome tiom da kandidatoj estas.

Billy Waldon

La prezidantino de la kunsido memorigis, pri la ekzistanta fonduso de SAT.

Pliaj komentoj ne estis kaj komenciĝis pritraktado de alia temo: enkarcerigo de membroj el la grupo de Moskvo "PORTOS". **K.Barkoviĉ** prezentis la lastajn informojn pri juĝproceso kiujn PK ricevis antaŭ la foriro al la kongreso. La juĝo de du viroj el la grupo estas ĉesita, ĉar oni deklaris ilin frenezaj kaj ili devos, - neniu scias kiom longe, - pasigi la vivon en frenezulejo. Du virinoj kiuj defendas sin mem, havis la okazon fari la defendo-paroladojn kaj la juĝistino decidis prokrasti la decidon de la tribunalo. *K-do* **K.Barkoviĉ** aldonis: ke povas esti, ke post fino de la kongreso alvenos novaĵoj el Moskvo kaj tiam ili estos aperigitaj en Sennaciulo. Li ankaŭ memorigis, ke SAT eldonis la poŝtkartojn, kiuj estis menditaj de SAT-anoj kaj senditaj al juĝejo. Tiuj bildkartoj atingis juĝistinon. Ŝi montris kelkajn dum la juĝproceso, do ili ne estis senutilaj. Eĉ se tio ne helpis, ili almenau ne estis forĵetitaj sen atenti pri ili.

K-dino **T.Sabatier** demandis ĉu post la kondamno de la rusaj kamaradoj eblos peti intermiksiĝon de Amnestio Internacia.

K-do **H.Peyrouty** diris, ke asocio devas serĉi iun eblecon helpi al rusoj, nur li dubis ĉu SAT kaj Amnestio Internacia povas intermiksiĝi en tiuj kazoj kiam membroj de grupo estas agnoskitaj kiel frenezaj.

K-do **Prent** proponis turni sin ankaŭ al Amnestio Internacia en Rusio. *K-dino* **F.Toubale** rakontis, ke ŝi ricevis la registritan leteron de Homaj Rajtoj el Rusio kaj ne scias ĉu ŝi devas al ĝi respondi. Ja letero estas sendita al ŝi persone, sed en teksto oni skribas al PK de SAT, dum ŝi ne estas membro de la PK.

K-do **K.Barkoviĉ** aldone klarigis, ke letero kiu venis de Moskvo estis respondo al sendita bildkarto kaj teksto estis en rusa lingvo. *K-do* **M. Duc Goninaz** tradukis la tekston kaj nun F.Toubale povas persone respondi la leteron. Ankaŭ SAT ricevis cirkuleran leteron, en kiu estas nenio por respondi, nur informoj, ke oni promesas ion fari. *K-do* **Barkoviĉ** aldonis, ke pri tiuj dosieroj kiuj arigas la dokumentojn pri grupo "PORTOS" ĉefe okupiĝis **Y.Peyraut** kaj nun kiam li forpasis tion devas transpreni iu alia. Ne nepre tio devas esti membro de la PK. Ankaŭ estas bezonataj libervolaj membroj de SAT kiuj okupiĝu pri tiu dosiero de B.Waldon kaj tio ne estu nur iu de PK, aŭ ne estu nur francoj kiuj ĉion faras.

K-do **M.Suarez** esprimis la deziron helpi al tiuj homoj, sed li ne povis proponi kion konkrete oni faru.

K-do **J.Schram** redemandis ĉu li bone komprenas, ke venas la propono al PK kaj membroj de asocio faru ion por helpi al kamaradoj laboristoj dise en la mondo per sia subteno aŭ malaprobo de agoj.

K-do **V.Charlot** diris, ke laŭ lia scio la PK de SAT estis la sola instanco kiu faris la provon helpi. La problemo laŭ parolanto estas kiel vigligi aliajn instancojn. Jam estas vigligita Ĝenerala Konsilantaro kaj venas la vico por aliaj. Maksimuma instanco por la movado estas la kongreso kaj eĉ pli ol kongreso, la membraro estas la maksimuma instanco. Laŭ *k-do* **V.Charlot** oni ne devas ĉiam peti la permeson de la PK por agi, eĉ ne PK devas diri kion fari. Do jam nun kongreso povus instigi la membraron por fari ion konkretan: kial, ekzemple, membroj per si mem ne kontaktu pro la mortpuno de B.Waldon la Amnestion Internacian aŭ aliajn instancojn. Tio devas esti la devo de ĉiu membro ekster la PK kaj nur havante ligon kun tiuj instancoj oni poste turnu sin al la PK kun raporto.

K-dino **Z.Banet-Fornalowa** komencis parolon per plendo, ke ŝiaj nervoj ne eltenas la laboron de kunsido. Ŝi diris, ke ŝi venas al kunsidoj, ĉar aferoj de SAT gravas por ŝi, tamen ŝi konkludas, ke kvankam la mondo rapide ŝanĝiĝas la laboro en kongresaj kunsidoj ne ŝanĝiĝas kaj ne evoluas. Ŝi proponis, ke PK kaj ĜK anticipe pripensu kion ili proponu al la kongreso. Kaj kongresantoj nur konkrete diru sian opinion pri diversaj temoj. Kiel eventualajn temojn ŝi proponis la eniron de sovaĝa kapitalismo al iamaj socialismaj landoj, senlaborecon, ekspluatadon k.t.p. Kiel aktualan temon ŝi sugestis: kiajn argumentojn PK proponas, ke SAT ne mortu. La rutinan pridiskutadon de la raporto de la PK ŝi konsideras senutila. Se organizantoj de kongreso proponus konkretajn pridiskutendajn temojn, la rezolucio ne estus nur la rezulto de unu persono kiu estas elektita por tiu tasko. La proponoj de temoj, laŭ *k-dino* **Z.Banet-Fournalowa** povus esti jam anticipe anoncitaj en Sennaciulo. Ŝi ankaŭ kritikis la salonon kie okazis la kunsido pro la malbona aŭdebleco kaj proponis post paŭzo ŝanĝi la salonon al pli eta kie estus pli intima etoso, pli bona kontakto kaj la laboro pli efika. Ŝi konkludis, ke multaj membroj de SAT restas en asocio pro fideleco, sed laboro dum kunsidoj ne instigas al reveno al kongresoj. Ili estas enuigaj kaj tiel forpuŝas alvenon de novaj membroj. La PK devus veni kun iuj proponoj por la diskuto dum la kongreso. Ŝi sentis sian devon ĉion diri kiel membro de SAT al kiu gravas la estonto de la asocio. *(Aplaŭdoj)*

Prezidantino de la kunsido *k-ino* **F.Toubale** komentis la vortojn de *k-ino* **Z.Banet- Fornalowa**, ke funkcio de PK ne estas fari proponojn, sed plenumi la decidojn de membraro. Ŝi bedaŭris, ke de membroj de la asocio ne venas instigoj kaj proponoj, sed ŝi mem eĉ ne restus en organizo kie PK proponas kion fari.

K-do **G. Cavalier** revenante al demando pri rusaj kamaradoj memorigis, ke laŭ la sperto de la kongreso en St. Peterburgo, kongreso povas sendi la protestleteron al kelkaj instancoj en Rusio aŭ informojn al internaciaj mondaj organizaĵoj.

K-dino **T. Sabatier** nur volis respondi al homoj kiuj demandis ĉu eblas dum la kongreso kolekti monon por la fonduso de B.Waldon. La respondo estas pozitiva.

K-do **M. Suarez** subtenis la proponon de G.Cavalier skribi la leteron je la nomo de la kongreso al diversaj instancoj defendante rusajn kamaradojn.

K-ino **S. De Weerd** volis nur ripeti, ke se iu volas la ŝanĝojn en la statuto, devas ankaŭ agi laŭ la Statuto, nome aperigi la proponon ĝustatempe en Sennaciulo kaj dum la venonta kongreso la propono estu pritraktita.

K-do **V. Charlot** rimarkis, ke nun en la diskuto oni ligas ne selektitajn temojn. Unue li proponas paroli kiel ni ŝanĝu la disvolviĝon de la kongreso, poste venos la demando kiel venigi la homojn al SAT, sed tio estas apartaj temoj. Li konstatis, ke laboro de kongreso jam ŝanĝiĝas, ĉar oni ne plu legas la tutan tekston de la raporto de PK. La plua decido laŭ li povus esti, ke parolantoj nur diru ĉu ili havas ion por diri pri la raporto aŭ ŝanĝi kaj tio rapidigus la diskuton. Kaj la ĉefa diskuto laŭ opinio de *k-do V.Charlot* devas esti pri fundamentaj, gravaj demandoj.

Prezidantino de la kunsido *k-dino F.Toubale* proponis decidi ĉu la kongreso skribos la leteron defendantan rusajn kamaradojn kaj la temon "kongresoj" lasi por pli posta diskutado en alia salono kun pli bona aŭdebleco.

Ĝenerala sekretario de PK *k-do* **Barkoviĉ** aldone proponis, ke en la sama salono oni ankoraŭ pritraktu la temon *"SAT kaj reto"*, ĉar en salono estas praktikaj rimedoj por demonstri la paĝojn de SAT.

Kongreso voĉdonis por ke letero estu skribita kaj prezidantino de la kunveno petis volontulojn por fari la tekston.

K-ino **A.Montesinos** sugestis, ke estus bone havi unu preparitan tekston kiun sendu tiuj el kongresanoj kiuj deziras.

K-do **M. Audibert** havis la demandon ĉu SAT jam faris tiel, ke oni havu la pretan tekston kaj ĉiu membro poste sendu ĝin al internaciaj instancoj je sia nomo.

Prezidantino de la kunveno konfirmis, ke nome tio estis la ideo kaj *k-do* **K.Barkoviĉ** aldonis, ke tio estis farita. La poŝtkarton similan al tiuj de A.I. eldonis SAT. Nun kongreso volas puŝi A.I., ke ĝi subtenu tiujn homojn, ĉar ĝis nun A.I. rifuzis tion fari.

Pritraktante la temon "SAT kaj reto" ĉeestantoj de la kunsido povis sur granda ekrano vidi paĝojn de SAT. Per komputoro manipulis *k-do A.Prent* kaj ĝenerala sekretario de PK k-do *K.Barkoviĉ* konatigis la kongresanojn kun la strukturo de paĝoj, rakontis ke pri hejmpaĝo zorgas la juna japana kamaradino Viola, kiu estas tre aktiva kaj entuziasma. En la dua parto de la kunsido unue estis pritraktitaj kelkaj organizaj demandoj kaj kongreso daŭrigis la laboron.

La unua temo estis la venonta kongreso en La Chaux-de-Fonds kaj por inviti kongreson alparolis ĉeestantojn s-ino **M.F.Conde-Rey**. Ŝi komencis per bedaŭro, ke ŝi estis ĉagrenita dum pli frua kunsido: ŝi aŭdis *k-don V.Charlot* paroli pri Esperanto-Civito negative. Laŭ M.F. Conde-Rey ĉiu rajtas havi sian opinion kaj esprimi ĝin, sed ŝi demandas kongresanojn ĉu ili estas sufiĉe bone informitaj pri Esperanto-Civito. Ŝi diris, ke ne estas ŝia celo nun paroli pri E.C., sed se SAT-membroj vidas en ĝi danĝeron por SAT aŭ por Esperanto mondo, ŝi konsilas sekvi la statuton de SAT kaj : "pli bone informiĝi, bone kompari, ĝuste kompreni kaj elekti memstare la vojon." Poste ŝi prezentis la urbon kie okazos la venonta SAT kongreso. La mezgranda urbo situas en la nordokcidento de Svislando, proksime de franca landlimo. En urba biblioteko estas interesa kolekto de E-verkoj, dokumentoj. Urbo mem havas kelkajn rimarkindajn vidindaĵojn: muzeon pri horloĝoj, ne ordinaran horloĝon en urba parko k.t.p.



Ĉarmaj junaj hispaninoj distris nin per folkloraj dancoj.
Fotis: L. Gabalda

K-do **K. Barkoviĉ** aldonis, ke ĉiuj loĝlokoj estas proksime de haltejoj de urba trafiko kaj kongresejo en la liceo sur la monto estos facile atingebla. Kongresejo estas moderna, bonege ekipita kaj apud la liceo estas parkejo kiu estos rezervita por kongresanoj kiuj alvenos per aŭtomobilo.

M.F.Conde-Rey ankaŭ klarigis pri la eblecoj atingi kongresurbon per trajno.

K-do **K.Barkoviĉ** diris, ke kondiĉoj estos vere bonaj kaj prezoj kvankam okcidentaj tamen malpli altaj ol kutime en Svislando. La dato de la kongreso estos la dua semajno de julio, de la 12-a ĝis la 19-a de julio 2003.

M.F.Conde-Rey diris, ke ekzistas junlargastejo kaj amasloĝejo por tiuj kiuj volas havi malpli kostajn tranoktadojn.

K-do **D.Levitan** demandis ĉu estos ebleco ten-

dumi.

K-do **K.Barkoviĉ** konfirmis, ke tendumejo ekzistas, atingebla per buso. Laŭ impreso de K. Barkoviĉ urbo estas bela kaj sufiĉe granda.

K-ino **Z.Banet-Fornalowa** demandis ĉu estos kontaktoj kun urbaj respondeculoj kaj sindikatistoj.

Al tio ĝenerala sekretario de PK respondis, ke jam estas kreita OKK kaj PK havos la kontakton kun ĝi kio ebligos interkonsenti ankaŭ pri tiaj programeroj. Li aldonis, ke organizi kongreson por KCE estos certe multe pli facile ol por sola Marteno kun helpo de lia edzino.

K-do **M.Bustin klarigis**, ke li kontaktis ĉiujn urbajn instancojn kaj nur la lastan momenton li eksciis, ke neniu venos, ĉar okazas kunveno, sed li opinias, ke simple esperanto por urbaj funkciuloj estis ne grava afero. Li kontaktis ankaŭ sindikatojn, sed ĉiuj rifuzis veni al renkontiĝo kun kongresanoj.

Al demando ĉu ankaŭ okazos la postkongreso aŭ antaŭkongreso *k-do* **K.Barkoviĉ** konfirmis, ke KCE pretas tion organizi, se estos sufiĉe da intereso flanke de partoprenantoj. Tiu intereso devas esti frue kaj klare montrita. SAT daŭre kontaktas la organizantojn pro la organizado de kongreso, sed antaŭ kaj postkongresoj, ne estas la afero de SAT. Al demando kiu estas en O.K.K *k-do K.Barkoviĉ* diris, ke nomoj aperos en Sennaciulo. Li substrekis, ke inter SAT kaj KCE estas interkonsento pri SAT kongreso laŭ la SAT regularo kaj estos ankaŭ aliaj aktivaĵoj. Al demando ĉu ankaŭ Esperanto Civito partoprenos en la organizado de kongreso ĝenerala sekretario de PK klarigis, ke kongreson organizos KCE kaj tie estas homoj kiuj estas en Esperanta Civito. Ja tio estas ilia rajto same kiel rajto de iu ajn de ni., sed kun E.C. SAT subskribis nenian kontrakton. Al rimarko, ke pro EC aperas kvereloj en movado, *k-do K.Barkoviĉ* reagis, ke bedaŭrinde, en Esperanto movado oni konstante kverelas kaj anstataŭ esti toleremaj kaj amikaj, homoj ofte estas agresemaj kaj kritikemaj.

K-dino **S. de Weerd** diris, ke jam okazis tre sukcesa feria semajno en KCE kaj ĉio estis bonege organizita, en tre bela loko, do ŝi konsilas sen duboj akcepti proponon organizi kongreson en La Chaux-de-Fonds.

M.F.Conde-Rey aldonis, ke por ŝatantoj migri estas tre konvenaj, belaj lokoj kaj oni ne forgesu kunporti migradŝuojn.

K-dino **Z. Banet-Fornalowa** proponis, ke nun oni ne revenu al temo Esperanta Civito. Ŝi memorigis, ke KCE estas historie ligita kun laborista movado kaj tiu centro estas grava por laboristaj agantoj. Laŭ ŝi la programo de la kongreso devus speguli tion per prelegoj. Ŝi ankaŭ iomete rakontis pri interesa arkitekturo de la urbo.

Prezidantino de la kunveno *k-dino* **F.Toubale** dankis al M.F.Conde-Rey pro la invito kaj kongreso daŭrigis la laboron.

K-do **S.Keable** diris, ke li havas la senton, ke mankas iu skribita propono al kongreso por krei la gvidrezolucion kaj deklaracion. Laŭ li estus bone havi la tekston jam anticipe prezentitan en Sennaciulo por ke ĉiuj konatiĝu kaj dum kongreso pridiskutu.

K-ino **F.Toubale** rimarkis ke tiuj dokumentoj devas esti la sekvo de la kongresa laboro kaj estus malfacile antaŭvidi kiel estos.

K-do **S.Keable** proponis kelkajn punktojn por igi kongresojn pli demokrataj kaj pli efikaj. Unue estus bone, se ĜK antaŭ la kongreso verkus malnetojn de deklaracio kaj gvidrezolucio kiujn poste kongreso amendu. Tiuj tekstoj en iu formo (ekzemple pere de Sennaciulo) estu disdonitaj al ĉiuj membroj. *K-do S.Keable* ankaŭ proponis, ke



Prezidanto de la O.K.K. k-do Marteno Bustin kun la brila preleganto pri Garcia Lorca.
Fotis: L. Gabalda

dum la unua laborkunsido estu elektita kongresa komisiono kiu proponu al kongreso la tagordon. La komisiono havus la rajton ŝanĝi la tagordon por pritrakti ĉefajn kaj gravajn temojn, evitante rutinajn temojn de la jara raporto de PK.

K-do **J.Schram** konsentis ke ideo estas bona, se estus homoj kiuj proponas ion kio utilas al SAT. Tio ne devas esti iu komisiono kiu laboras en angulo, sed membroj kiuj per Sennaciulo faru proponojn. Li ne sukcesis ĝis nun laborigi la Ĝeneralajn konsilantojn agi en tiu direkto, kion li ege bedaŭras.

K-dino **S. DeWeerd** konsilis, ke oni legu kaj relegu la Statuton de SAT kaj agu laŭ ĝi. Statuto klare diras, ke kongreso esploras diversajn proponojn pri la agado por la venonta jaro. Proponojn rajtas sendi ĉiu aktiva membro k.t.p. Laŭ ŝi, en la Statuto estas klare priskribita kiel oni devas fari la proponojn.

K-dino **T. Sabatier** diris, ke ŝajnas al ŝi, ke sufiĉus unu kunsido kie oni parolu pri la pasinta jaro kaj partoprenantoj nur decidu ĉu ili akceptas la raporton. Tio lasus tempon por ĉefe paroli pri estonto, kio gravas. Ŝi proponis, ke por la venonta kongreso kiu okazos en lernejo estu interkonsento pri ebleco uzi retaliron. Ŝi ankaŭ diris, ke laŭ ŝia scio ekzistas libro kun la spertoj de antaŭaj organizantoj de kongresoj kaj homoj kiuj jam organizis

kongresojn povus atentigi pri iuj punktoj kiuj ne sufiĉe bone realiĝis. Ŝi ankaŭ diris, ke se eblus kunsidi sidante en la rondo, ne tiel ke iuj sidas sur podio, estus pli konvene.

K-do **S. Keable** atentigis, ke tio kion li proponas ne postulas la ŝanĝon de regularo. Ja oni rajtas diskuti, proponi k.t.p. nur kongreso fiksus la tagordon aŭ povus se necesas ŝanĝi ĝin.

K-do **A.Prent** diris, ke dum la lastaj kongresoj li multe studis kio okazis, kiel venis la proponoj de diversaj membroj: ĉeestantaj, tiuj kiuj minacas foriri, tiuj kiuj foriris k.t.p. Li diris, ke se li eniros la novan PK li prenos la taskon okupiĝi pri la programo de la kongreso, ke ĝi estu alloga ne nur al tiuj kiuj venas pro bona amika etoso, sed ankaŭ al tiuj kiuj volas profiti la kongreson por priparoli profundajn aferojn de SAT. Li vidas, ke eblos ŝanĝi la laborkunsidojn sen ŝanĝi la Statuton.

Prezidantino de la kunsido proponis pritrakti la temon "Ĝenerala konsilantaro" kaj ŝi demandis ankaŭ ĉu dum la kongresa semajno iu jam decidis aldone kandidatiĝi al PK. Ĝenerala sekretario de SAT klarigis, ke nun estas la lasta momento kiam eblas kandidatiĝi al PK, ĉar kongreso havas rajton akcepti pliajn kandidatojn.

Finfine, post amika premo de kongresanoj *k-do* **M.Bustin** akceptis esti la oka kandidato al PK.

K-do **M Duc Goninaz** parolis pri Ĝenerala Konsilantaro kaj demandis kie mankas la ĝeneralaj konsilantoj laŭ la geografiaj sektoroj.

K-do ***R. Lynn*** reagis, ke ĜK havas la reprezentantojn en ĉiu LEAo.

K-do **V.Charlot** diris, ke 4 horzonoj estas prezentataj kaj multaj aliaj tute ne, sed eble el unu horzono povas esti kelkaj ĝeneralaj konsilantoj.

K-do **K. Barkoviĉ** klarigis ke laŭ tradicia kompreno la konsilantoj devus esti de diversaj horzonoj, sed praktike tio neniam funkciis bone. Laŭ la statuto devus esti kaj konsilanto kaj lia anstataŭanto de unu horzono, sed tio ne estas reala nun kaj li proponas, ke estu serĉataj homoj kiuj volas agi, doni konsilojn al PK, kontroli ĝin sen atenti pri tio de kia parto de la mondo la persono venas. Li sugestis kandidatigi tiujn kiuj estas pretaj labori por SAT.

K-do **Yamasaki** indikas ke la rolo de Ĝenerala Konsilantaro estas kontroli la agadon de Plenum-Komitato kaj konsili.

K-do **J. Schram** proponis, ke homoj kiuj dum la kongreso kritikas kaj havas multajn rimarkojn kandidatiĝu al ĜK, ĉar tie ili povus fari valoran laboron.

K-do **Suarez** rimarkigis, ke ne eblas havi ĝeneralajn konsilantojn en ĉiuj horzonoj, ĉar ja ne estas membroj ĉie. Li proponis unue varbi membrojn dise en la mondo.

K-do **A. Prent** proponis pripensi, ĉu ne eblus plilarĝigi la horzonojn aŭ havi la konsilantojn de la tuta mondo laŭ la kvanto de membroj en diversaj landoj.

Prezidantino de la kunveno *k-dino* **F. Toubale** antaŭ la transiro al alia temo demandis ĉu iu el ĉeestantoj pretas kandidatiĝi al ĜK kaj neniu sin anoncis.

La sekva pritraktata temo estis "Amikeca reto", sed venis la demando ĉu jam estas iuj kandidatoj por organizi la kongresojn por venontaj jaroj.

K-do **K. Barkoviĉ** diris, ke neniu kandidatiĝis post La Chaux-de-Fonds. En Germanio kongreso ne okazos, ĉar germanoj respondis, ke ili pro diversaj kialoj ne pretas ankoraŭ tion fari. Li demandis ĉu iu de ĉeestantoj pretus tion fari? Ja ofte venas kritikoj, ke PK ne sufiĉe esploras eblecojn organizi kongresojn.

K-do **J. Schram** komentis, ke organizi kongreson ne estas problemo. Problemo estas trovi konvenan lokon por loĝi kaj por kongresi, kaj por normalaj prezoj.

K-do **K. Barkoviĉ** diris, ke oni ne devus kritiki aliajn kiam oni ne havas alian proponon. Rilate la kongresojn, estas la ebleco havi kongreson en Slovakio, sed problemo estas, ke dum la lastaj jaroj multaj SAT-anoj plendis kial kongresoj okazas en orientaj landoj. Nun ni kongresas en okcidento kaj tamen la kvanto de partoprenantoj ne estas alta. PK atendas proponojn por la venontaj jaroj aŭ akceptos proponon pri kongreso en Slovakio.

K-do **M.Bustin** montris la afiŝon de kongreso de SAT kiu okazis en Hispanio en la jaro 1934, kiu estis la unua SAT-kongreso en Hispanio, en Valencio.

Revenante al temo *"Amikeca Reto"* la respondeculo de servo *k-do* **G. Rollin** prezentis ĝin. "Amikeca Reto" kreiĝis antaŭ 15 jaroj kaj estas memstara asocio kaj servo de SAT. Li invitis ĉiujn al kunveno posttagmeze kaj diris, ke li pretas respondi ĉiujn demandojn.

K-dino **T.Sabatier** donis kelkajn klarigojn pri la diferencoj inter "pasporta servo" kaj "Amikeca Reto", nome, ke membroj de "Pasporta Servo" gastigas homojn, dum tiuj de "Amikeca Reto" ankaŭ donas informojn, gastigas, gvidas.

K-do **G.Rollin** substrekis, ke du servoj estas diferencaj kvankam ambaŭ eldonas la libron kun informoj kiujn aĉetanto rajtas uzi. Li ankaŭ diris, ke estis espero altiri membrojn al SAT tiamaniere kaj doni la informojn por esperantistoj. Kiel ekzemplon li prezentis eblecon vojaĝi al Moskvo, kio eblas sen kontaktoj kun esperantistoj. Ja ekzistas diverslingvaj gvidlibroj, sed sen kontaktoj kun esperantistoj ne eblas viziti lernejon, sindikatejon, fabrikon k.t.p. Tiaj kontaktoj ebligas interŝanĝi informojn kaj spertojn kaj tio kongruas kun la ideoj de la Statuto de SAT.

Al demando ĉu la prezo de la libro estas sama por membroj de SAT kaj nemembroj k-*do* **G.Rollin** respondis pozitive kaj klarigis kiel aliĝi al servo kaj kiel oni rajtas uzi la libron. La membroj de "Amikeca Reto" la adreslibron ricevadas senpage.

La sekva temo estis *"Sennaciulo"* kaj prezidantino de la kunveno *k-dino* **F.Toubale** petis esprimi sin.

Redaktoro de "Sennaciulo" *k-do* **K. Barkoviĉ** diris, ke li petas sugestojn, proponojn, kritikojn kaj ankaŭ opinion de kongresanoj ĉu aperigi S-ulon en la reto. Laŭ lia opinio tio ne estus bona solvo, ĉar parto de abonantoj ne plu abonus la gazeton. Al SAT same kostas ĉu eldoni la gazeton en 500 aŭ en 1000 ekzempleroj kaj por ekspedi ĝin estas prefere havi 1000 ekzemplerojn, ĉar tiam SAT havas la rabaton. Nun en reto aperas la tri unuaj paĝoj de la gazeto por prezenti ĝin.

K-do **G. Rollin** diris ke li memoras tempojn kiam dum kongresoj homoj ne emis paroli kaj Kreŝo kuraĝigis

partoprenantojn ion diri. Poste estis tempo kiam mankis la materialo por "Sennaciulo", sed nun oni verkas. Do, venis tempo por la diversaj rubrikoj. Parolanto mem respondecas pri unu rubriko, sed devus esti vere diversaj: pri lokaj agadoj, pri sindikataj aferoj, novimperialismaj bataloj k.t.p. La rubriko kreas la bezonon kaj por Sennaciulo oni bezonas ne longajn artikolojn, la lastaj taŭgas por Sennacieca Revuo.

K-do **V. Charlot** diris, ke laŭ li dum lastaj du jaroj la aferoj pliboniĝis kaj ni vere estas sur bona vojo. Li proponis en la reto aperigi la antaŭajn numerojn de Sennaciulo, eble eĉ en la parto "arkivoj", kvankam denove oni devus trovi iun kiu zorgu pri tiu afero.

K-do **J.Wilfred** demandis ĉu ne eblus en Sennaciulon meti la reklamojn por gajni monon.

K-do **K.Barkoviĉ** respondis, ke por ricevi rabaton por la ekspedo de la gazeto oni ne rajtas meti pagatajn reklamojn. Ĉiuj reklamaj informoj kiuj aperas en Sennaciulo estas senpagaj kaj pli informoj ol reklamoj. La ekzemplerojn de Sennaciulo ricevadas diversaj instancoj en Francio kaj kontrolado ĉiam eblas.

K-dino **T.Sabatier** atentigis, ke SAT amikaro ankaŭ petis tiun rabaton por sia gazeto kaj ricevis la alvokon, ke gazeto estu prezentita plene tradukita.

K-do **S.Keable** subtenis la proponon de *k-do V.Charlot*, ke aperigo de malnovaj numeroj en reto estus utila por tiuj kiuj interesiĝas kio okazis en SAT dum pli fruaj jaroj.

K-dino **J.Ternant** precizigis la nombron de la partoprenantoj en la kongreso kaj klarigis, ke SAT- Amikaro petante la rabaton por la ekspedo devis nur unufoje traduki la kompletan numeron de gazeto, sed poste ne plu.

K-do **A.Prent** diris, ke li hontas, ke kiel peranto li ne prizorgis la materialon por la gazeto pro tro da diversaj aktivecoj, sed li konscias, ke li devas serĉi kiu tion faros.

K-dino **Z.Banet-Fornalowa** opiniis, ke SAT kiel kleriga asocio devus havi kulturan paĝon en Sennaciulo. Laŭ ŝi tio ne ĉiam devas esti recenzo, sed povas esti aliaj artikoloj kiuj konvenus al la rubriko "kulturo".

Redaktoro de la gazeto *k-do* **K. Barkoviĉ** proponis, ke k-*dino Z.Banet-Fornalowa* gvidu tian rubrikon: kolektu la materialon de ĉiu kiu sendas, redaktu la paĝon kaj tiam sendu ĝin al redakcio. *K-dino* **Z. Banet-Fornalowa** akceptis tiun taskon kaj sugestis ĉiujn aktive kunlabori.

K-do **J.Ŝchram** diris, ke en Sennaciulo li ofte vidas la nomon "Jakvo" kaj li alparolis tiun personon demandante ĉu li ŝatas traduki artikolojn. Jakvo respondis, ke li tute ne ŝatas tion, ke tio estas teruraĵo, sed li faras tion pro sento de respondeco, ke kiel SAT membro li klopodas informi aliajn homojn. Li postulas, ke ankaŭ aliaj tion faru, eĉ se kontraŭvole traduku la tekstojn kaj informu aliajn SAT membrojn kio okazas en la mondo.

K-do **P.A.Garrote** havis la demandon al redaktoro en kiu rubriko plej mankas la materialo.

K-do **K. Barkoviĉ** diris, ke tro da materialo ne estas. Grandan parton de materialo li prenas de reto. Ekzistas ankaŭ rektaj kulaborantoj, sed ofte estas problemo, ke ili skribas tro longajn artikolojn. Homoj ne kapablas skribi koncize kaj li estas devigata akcepti la longajn por ne ofendi kaj ne perdi la aŭtorojn. Ofte li petas mallongigi, ĉar legantoj ne legas longajn tripaĝajn artikolojn. En Sennaciulo, do aperas tio kion oni sendas.

K-do **Garrote** diris, ke reto estus bona rimedo por propagandi Sennaciulon, sed tri unuaj paĝoj ne sufiĉas por tio. Devus esti elektitaj kelkaj bonaj artikoloj kiuj ekinteresus la legantojn. Ankaŭ valorus en nacia lingvo aperigi la tradukojn de kelkaj bonaj artikoloj kiuj povus konatigi homojn kun SAT kaj tio estus bona reklamo por asocio.

K-do **P. Hernandez** diris, ke gazetoj ĝenerale ne enspezas de aĉetantoj, sed de reklamo. Ĉar Sennaciulo havas problemojn, li konsentas, ke ideo publikigi antaŭajn numerojn en reto estas bona ideo kaj li pretas traduki artikolojn, se estos necese al hispana lingvo.

K-dino **T. Sabatier** rimarkis, ke multaj SAT anoj verkas por Laŭte kaj tiuj artikoloj ofte konvenus por Sennaciulo. Ŝi ankaŭ havis la demandon kiamaniere aliaj gazetoj kiuj estas en reto povus havi la ligon en paĝo de SAT.

K-do **K. Barkoviĉ** respondis, ke se oni volas havi tiun ligon oni devas peti ĉe SAT kaj tion estos simple aranĝi.

K-do **V. Charlot** proponis ke UNESCO-paĝo havu tiun ligon, ĉar kelkaj esperantaj paĝoj jam tion faras.

K-do **G. Rollin** diris, ke en la hejmpaĝo de Amikeca Reto (sub rubriko Forumoj) li kelkfoje enmetis tekstojn laŭ temoj kaj kiuj volas povas vidi ĉiujn en rubriko aperigitajn tekstojn, kontribui kaj reagi. Tio estas vojo por aktivigi homojn.

K-do **R. Prevost** plendis, ke ofte tekstoj kiujn li proponas ne aperas en Sennaciulo, sed Laŭte akceptas, do li preferas sendi al Laŭte. Do, estus bone, ke ne akceptitaj artikoloj estu resenditaj.

Redaktoro de Sennaciulo *k-do* **K. Barkoviĉ** respondis, ke kutime oni ne resendas artikolojn kaj li estas tro okupita, sola en sidejo kaj ne povas fari ĉion sola kvankam devas sola respondeci pri ĉiuj mankoj. Li ankaŭ memorigis, ke ĉu aperigi artikolon aŭ ne, decidas redakta komitato kaj PK. Sola redaktoro ne cenzuras artikolojn kaj ne decidas kion aperigi. Li atentigis, ke artikoloj devas esti ĝenerale interesaj por la legantoj, ne nur por la legantoj de unu regiono. Redaktoro nur zorgas, ke artikoloj estu mallongaj, klaraj, en bona stilo, sen ŝanĝi la stilon de aŭtoroj. Nu, eble estus bone kaj eble estus momento ke oni ŝanĝu la redaktoron.

Per tio finiĝis la tria laborkunsido.


***

KVARA LABORKUNSIDO

Dum la kvara laborkunsido oni traktis kaj poluradis la Deklaracion kaj Gvidrezolucion. post multaj intervenoj kaj korektoj ili estis definitive adoptitaj kaj aperis en julio-aŭgusta numero de Sennaciulo.

Kompilis: G.O. kaj K.B.

El la SAT-sidejo
67 avenue Gambetta
FR-75020 Paris



NOVA P.I.V.

Lanĉoprezo :
por Francio 70 € + 4,27 € (afranko)
por Eŭropo: 70 € + 7 € (reg.afr.)
ekster Eŭropo :70 € + 9 € (reg. afranko).
Ni petas ĉiujn mendantojn iom pacienci ĉar ni ne estas nombraj en la oficejo kaj necesas iom da tempo por paki kaj ekspedi la menditajn librojn.

NOVALIĜOJ

35.568 Nobst Kurt, Mittelweg 9, DE-16356 Blumberg, Germanio
35.569 Sossois Georges, rue De Basson 79, BE-6001 Marcinelle, Belgio
35.570 Keable Ken, Kilclooney, Kilmacthomas, Co. Waterford, Respubliko Irlando.
35.571 Rooke Dieter, äussere Klus 14, CH-4702 Oensingen, Svisio
35.572 Amacu Sejgou, Goryo 105-11, JP-869-0551Siranui-tyo, Uto-gun, Japanio.
35.573 Nedev Nedko, str. Temenuga 1, BG-7078 Ŝtraklevo, Rusenska obl., Bulgario

HELPO AL LA ASOCIO

En Francio (€) A. Weiss 50,00; J.J. Aumeunier 27,00; MKE 150,00; G. Michaud 20,00;
En Britio (GBP) R. Roberts 59,00;


FONDUSO WALDON

Kolekto en Alikanto 135,00 €; Grupo de japanaj gekamaradoj 57,07 €;

SOLIDARSERVO

En Parizo (€) MKE 50,00;

SAT havas novan domajnadreson:
www.sat-esperanto.org



Ni legis por vi...

Aviada Terminaro,
de Gilbert Ledon, Fonto eld. 2002



Post *Ikaro ne songis* nia ano G. Ledon, aviadisto, ĵus aperigis tiun mirindan verkon konsistantan el 4 partoj: 1) Aviada Terminaro riĉa de multe pli ol 1000 specialaj terminoj; 2) pli ol 20 Ilustraj Platoj klarigantaj ilin; 3) Aeronaŭtika Vortaro Angla-Esperanta (laŭtema) de pli ol 4000 vortoj, ĉar la angla estas duonoficiala en aertrafiko; 4) Baza Aviada Frazeologio (por radiofonia aertrafiko) kun komparo kun la anglaj terminoj pro la sama motivo. La celo anoncita en l'antaŭparolo estas prezenti alian eblecon ol la anglan, kiu fonetike ne taŭgas, kiel scias ĉiuj konantoj de ĝi, interalie la anglalingvaj esperantistoj. Tamen la opinio, ke Esperanto alportas bonan solvon devus esti kompare studata en fonetikaj laboratorioj, kiel ekz. tiu de J. Wells… Ni ne ĉiuj prononcas ĝin bone, kaj konas foje malfacilan interkomprenon pro tio; ne estas ofendo diri, ke oni devas peti ripeton de kelkaj el ni, kiuj konservis tro naciecan tonon en Esperanto. La proponitaj neologismoj estas plej necesaj: *avio* estas logika kompare kun la tradicia *aviadilo;* same *kartro, deflektoro, streno, glob(et)o* (la uzantoj certe lasos fali la *et* de tiu diabla malamiko de komencanto, kiu obstine glitas tien kaj reen ĉe ĝirejoj, anstataŭ kviete dormi en la mezo, kiel dum ĝirado far instruisto). Sed kial difini ĉi tie la simplajn vortojn *akvo, amboso, bombo* aŭ *kasko ?* Ĉu *ĉiklono* ne konfuzeblas kun *ciklono* kiam *jamas trombo?* Surmara aŭ surtera, ĝi ja estas la sama fenomeno. Bedaŭrinda francismo estas la konservo de *enverguro,* el malnova marnaviga *vergue (jardo),* longo de la velo ŝovebla sur la jardo, kiam ni jam havas *spano*, kaj kiam ĝuste la angla termino ankaŭ estas *span*. Kial la neologismo *ĵiri*, konfuzebla kun *ĝiri*, kiam ekzistas *flirti*? Esence grava estas eviti rimantajn vortojn: *supren / malsu-*

pren kaj diri *alten / basen*; *dekstren / maldekstren* kaj diri *dekstren / liven*); ĝuste pro konfuzeblo en bruego de ŝtormo la paroj *bâbord / tribord* nun estas oficiale malpermesitaj en la franca marnavigado dum ŝipa stirado profite de *à droite / à gauche*... Same ĉu la rimaj *pozitiv'* kaj *negativ'* estas necesaj, kiam *jes* kaj *ne* tute klare malsimilas, kaj povas esti facile ripetataj: *jes-jes* kaj *ne-ne* ? Alia problemo estas la eldirado de simplaj literoj en radiotelefonio: Waringhien jam okupiĝis pri tio; la nova Dictionnaire Pratique Franca > E-a kaj E-a > Franca de SAT-Amikaro p. 18 malsimile pritraktas tion; tio valorus la penon demandadi la Akademion pri unueciga decido ĉi rilate. Same pri konsilata uzo de nur tri tempaj indikoj: *-u*, *-as* kaj *-ata* ĉar la dialogo limiĝas al komandoj de la regoturo kaj obeaj respondoj de la avio. Diable! inter radoj elig<u>ataj</u>, kiuj post unu sekundo blokiĝos en duona pozicio kaj malhelpos alteriĝon, kaj radoj jam korekte elig<u>itaj</u>, estas ega diferenco; la paro *-ata -ita* restas nepre necesa.

Tiuj nur kelkaj misetoj el miloj kaj miloj da terminoj fakte reliefigas la bonegon de la cetero de l'verko: ega laboro, kiu hisas Esperanton al nivelo de teknikilo en plej modernaj medioj. Gilbert Ledon tiel faris al Esperanto kaj al la homaro servon ĝis nun senkomparan, kondiĉe ke la homaro konsentu al neŭtrala "studado de farebleco". Ni ŝuldas dankegon al li kaj al *Fonto* por tiu preskaŭ perfekta laboro.

Luko

Ĵus aperis ĉe SAT

Djémil KESSOUS

La

UNIVERSALISMO

Historio, ekonomio kaj filozofio

Sennacieca Asocio Tutmonda

Prezo : 12 € inkluzive la afrankon.
Mendebla ĉe SAT.

SATanoj en Fortaleza

YAMASAKI Seikô

Okazis la kunsido de SATanoj aliĝintaj al la Universala Kongreso de UEA, la 5an de aŭgusto, 12h00-13h15 kun partopreno de 27 personoj, el kiuj 13 SATmembroj. Prezidis Gilbert LEDON, kiun helpis YAMASAKI Seikô. Ili klarigis ke tiu kunsido havas kiel taskon informi pri SAT, korektante plurajn miskomprenojn kaj eksplikante ke SAT ne estas politika organizo sed organizo por klerigi la laboristaron per esperanto. Tion komplementis Vilhelmo LUTERMANO.

Raportis Vincent CHARLOT pri la SAT-kongreso en Alicante, precipe pri la Statutŝanĝo entenanta revizion pri la elektomaniero de la Plenumkomitato.

Diskuto estis arda sed humurplena, interalie pri:

1) ***la neceso batali kontraŭ la tiel nomata tutmondiĝo***

Gilbert Ledon oratoras pri la minaco de la diverseco kontraŭ la kongresa temo: «Diverseco - ŝanco, ne minaco», kio ŝajnas laŭdi la tutmondiĝon. Lia kutima sofismo, kies kvintesenco estas universalismo, tamen kaptas la veron. Humphrey Tonkin, reĝisoro de la kvar sesioj pri la kongresa temo, vidis la akran senton de Ledon kaj inkluzivigis en siaj multaj legmaterialoj la kopion de artikolo de Ledon aperinta en la magazino MONATO, eksplikante ke li ne konsentas kun la opinio de Ledon. La organizado de debatoj fare de Tonkin estis brila, sed li preterlasis la negativan karakteron de diverseco. Li skribas en la Kongreslibro ke la avantaĝoj de la tutmondiĝo estas aĉetataj je la kosto de multaj. En tiu okazo, oni devas nur provi eviti tiajn negativajn flankojn. Ne tiaj tamen absolutaj venenoj ekzistas en la diverseco mem, kiel Ledon asertas, en ekz. fanatika islamismo.

2) ***difino de la laboristo, -***

Ledon ankaŭ ĉi tie argumentis ke li estas entreprenisto sed mem laboras, kaj ke li ne estas ekspluatanto.

3) ***la neŭtraleco,***

Ni klarigis ke jam ĉe la momento kie oni esperantistiĝas, oni elektas, engaĝiĝas, kiel diris SATana UEA-eksprezidanto Kep Enderby. Kiam prezidanto petis lin al la podio paroli, li simple demandis el sia seĝo kiel iras la statutŝanĝo.

4) ***la neceso de neneŭtrala organizo paralele kun la amikaj rilatoj kun UEA***

Ni diris ke la kunsido de SAT-anoj en la adelajda UK en 1997 simbole montras la ĉeson de la skismo de post 1921, kaj ke la neŭtrala kaj neneŭtrala organizoj tenas dividon de laboro vid-al-vide de la neesperanta mondo. UEA ne povas kritiki la aŭtokratan registaron de iama Pollando sed SAT povas eĉ je la neeblo okazigi Kongreson en ties teritorio.

5) ***kontribuo al la esperanta kulturo en la formo de nova PIV.***

Kiel ni sentis nin fieraj al la neŭtraluloj apud la nova PIV en la Libroservo.

Tiamaniere, la kunsido plenumis la taskon kontentige kiel informcentro por neSATanoj.

Bedaŭrante mankon de tempo, la kunsido fermiĝis je la fiksita horo.

De las Jime'nez protestis ke ĉar ankoraŭ restas pendantaj tiom multe da interesaj diskutoj, oni devas plilongigi la sesion, sed la aŭtoro de tiu ĉi artikolo refutis ke difinita libera tempo necesas por glata scenejŝanĝo: kontraŭstaro inter anarĥiisto kaj disciplinisto (aŭ bolŝevisto?).